NIA PONTO

Grupo Esperantista	E-kursoj: Vendrede
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre	Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
E-48005-BILBAO (Hispanio)	Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
☎: 94.416.44.92	Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato
💻: tepgaitj@lg.ehu.es aŭ esperantobilbo@lettera.net	
Jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj	**BBK-konto: 22-1800155-0**

NOVEMBRO/DECEMBRO 1.999

MONTO-EKSKURSOJ.

La pasintan dimanĉon 26-an de Septembro, 5 membroj de nia Grupo ekskursis al monto Oketa. Al ili akompanis du el niaj amikoj de Vitorio, Rafa Blanco kaj Xabi Rico. Ankaŭ partoprenis neesperantista amikino. Suno regis dum preskaŭ la tuta tago, sed ankaŭ malvarmeta temperaturo, kio okazigis belegan tagon por marŝado. Suprenirado al monteto estis tre facila; post ĝi alvenis komuna manĝo kaj adiaŭa kunsido ĉe cidro-trinkejo. Krokodilado maloftis.



Partoprenantoj en la ekskurso al monto Oketa. Sur la fono videblas la fama monto "Gorbea", la plej alta de la provinco Bizkaja, kiu signas la limon inter la provincoj Alaba kaj Bizkaja. (Supre: Xabier Rico Iturriotz, Rafa Blanco kaj José Pérez-Salado; malsupre: Carlos Barrio, J. Miguel García Iturrioz, David Redondo kaj David Mediavilla).

ZAMENHOF-A FESTOTAGO (FIESTA DE ZAMENHOF).

Kiel kutime, ankaŭ tiun ĉi jaron ni celebros la naskiĝdatrevenon de la kreinto de nia Internacia Lingvo. Ni ĉiuj renkontiĝos la **sabaton 18-an de decembro** en nia klubejo. Je la **19,30 h.**, ni spektos E-videofilmon; post ĝi, estos diskutrondo kaj, ĉirkaŭ la 20,30 h., ni sidos ĉirkaŭ tablo, plenplena de la manĝaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj

NO LO OLVIDES: **EL SABADO 18 DE DICIEMBRE**, A PARTIR DE LAS **19,30 h.**, NOS REUNIREMOS PARA CELEBRAR EL ANIVERSARIO DEL NACIMIENTO DE L.L. ZAMENHOF. TE ESPERAMOS.

VIZITO AL LA GRUPO.

La pasintan 27-an de Aŭgusto vizitis nian Grupejon esperantistino el Bilbao kaj tre bona amikino, **Lourdes Martínez**. Malgraŭ ŝia juneco, dum multaj jaroj ŝi loĝis eksterlande kaj, fakte, kontaktis nin la pasintan jaron, pere de Pasporta Servo, kiam jam sufiĉe bone regis la Internacian Lingvon; ŝi ĝin lernis en Japanio, ene de E-familio; la pasintan someron ĉeestis la UK de Berlino kaj nun loĝas en Heidelberg (Germanio). Sur la foto, ŝi sidas maldestre, ĉirkaŭata de kelkaj bilbaoanoj.



NEKROLOGO.

La pasintan 23-an de oktobro mortis en Bilbao nia kara kaj neforgesebla amiko **Tomás Apraiz Riberas**. Ĉiam preta helpi la aliajn, estis, antaŭ ĉio, tre bonkora homo. Por ĉiam restos en nia memoro tiuj agrablaj horoj pasitaj en la Grupejo apud li kaj lia optimisma edzino, Cecilia, lia tipa maniero paroli Esperanton, tiel rapide, ke li preskaŭ pafis la vortojn, liaj ŝercoj kaj anekdotoj, ... Aktive li laboris ene de la loka movado: dum multaj jaroj estis la delegito de UEA en Bilbao; plurfoje apartenis al la estraro de la Grupo, estante prezidanto, vicprezidanto, sekretario, voĉdonanto,... kaj precipe homo ĉiam preta labori. Ke li pace ripozu kaj ni ne forgesu lian ekzemplon.



Tomás Apraiz (1915/1999)



KRISTNASKA LOTERIO.

Kiel kutime, ankaŭ tiun ĉi jaron eblas ludi la nacian kristnaskan loterion per biletoj presitaj de nia E-rondo. Ili estas tute esperantigitaj. Ĉiu kvitanco kostas 300 ptojn., el kiuj efektive oni ludas 250 ptojn., dum restas 50 pt. kiel mondonaco por la E-Grupo de Bilbao; por petoj eksterBilbao,aldonu la poŝtajn elspezojn. La ĉijara numero estos: **47.301**.



SUBVENCI-PETO RIFUZITA.

Tiel kiel ni informis en la antaŭa **NIA PONTO**, **David Mediavilla** plenumis subvencipeton al sia propra entrepreno, "Ikerlan", en la gipuzkoa urbeto Mondragón. La peto celis sendadon de diversaj E-libroj al bibliotekoj de Mondragón kaj de la apudaj urbetoj. Laŭ David mem informis, Ikerlan jam decidis pri la monhelpoj ĉi jaraj kaj nia propono ne sukcesis. Ni atendas pliajn klarigojn.

ARTIKOLO EN LA ĴURNALO "EGUNKARIA".



Laŭ iniciato de niaj samideanoj el Vitorio, **Rafael Blanco** kaj **Xabier Rico**, la sola ekzistanta ĉiutaga ĵurnalo en vaska lingvo, "Egunkaria", aperigis, la pasintan dimanĉon 19-an de Septembro, dupaĝan artikolon pri Esperanto, riĉe ilustrita per diversaj bildoj.

Post enkonduko al Internacia Lingvo, estis intervjuo al bilbaoano Eduardo Larrouy, kiu parolis pri la historio de Esperanto en Bizkaja; al tio akompanis artikoleto de Rafael Blanco kaj Xabier Rico pri la pasinta UK en Berlino.

TELEVID-ĈENO VIZITIS NIAN SIDEJON.

La pasintan vendredon 8-an de oktobro, la nacia televid-ĉeno "CNN+", ligita al "Canal+", vizitis nian sidejon por fari raporton pri la E-movado. Dum 2 horoj kaj duono ili filmis diversajn scenojn, dum ni obeeme sekvis la reĝisorajn rimarkojn de la ĉefrespondeculo.

Poste, la vendredon 15-an de oktobro, ili denove vizitis nin por filmi, ekster la Grupejo, diversajn E-simbolojn, kiuj ornamas la konstruaĵon.

MONTO-EKSKURSOJ.

(Daŭrigas el la 1-a paĝo).

Post tiu ekskurso al monto Oketa, pri kiu ni raportas sur la 1-a paĝo, estis programita suprenirado al monto Erlo (Gipuzkoa) la pasintan dimanĉon 17-an de oktobro. Kvar el ni kolektiĝis ĉe la start-punkto (la teatrejo "Arriaga"), sed pluvegis tiom multe, ke fine ni devis rezigni kaj reiri hejmen, kun malsekaj vestaĵoj kaj malvarmo enirinta niajn korpojn.

Memoru ke ankoraŭ restas du ekskursoj pliaj:

14 Novembro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10,30 h. el Dobro (Burgos). Ekskurso al Peña Alta de Dobro, 1.267 m.

12 Decembro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10,30 h. el Landeral (Cantabria). Ekskurso al Pico de las Nieves, 779 m. Ni esperas esti akompanataj de niaj kantabraj samideanoj.

PARTOPRENO EN TV-PROGRAMO.

La pasintan 28-an de oktobro, nia amiko **Patxi de la Hoz** partoprenis programon "KTM"de ETB-1. La programo estas direktita al gejunuloj malpli ol 16 jaraj, tute farita en vaska lingvo. Ili kontaktis nin pere de la reto kaj interesiĝis pri Esperanto kaj pri ĝia historio en Bilbao.

PAGO DE CUOTAS.

Si a la izquierda de estas líneas aparece dibujada una "X", significa que aun no has hecho el pago de tu cuota de soci@ correspondiente al presente año de 1.999. Te recordamos que es de tan sólo 15 euros (2.500 pts) y que puedes hacerla efectiva en la cuenta de la BBK que figura en el encabezamiento de esta circular. Así mismo, no te olvides de decir,al empleado de la BBK, que haga figurar tu nombre al hacer el ingreso.

NE FORGESU!!!: La **vendredon 10-an de decenbro**, je la **7,30 h.**, okazos **eksterordinara ĝenerala kunveno** de la sociaro de la E-Grupo de Bilbao. Vi trovos la tagordon en aparta paperaĵo. Ĉeestu, ĉar temas pri tre grava afero.

PROFITU LA OKAZON HAVI ĈE VI "DON KIĤOTO"-n.

Kiel anoncite, jam estas en nia Grupejo diversaj ekzempleroj de la majstra verko de la hispana literaturo "Don Kiĥoto de la Manĉo", kies aŭtoro, Miguel de Cervantes, estas mondkonata. Nun vi havas la eblecon ĝin aĉeti per sufiĉe malmulte da mono: nur 1.500 ptojn., ĝis la 31-a de Decembro; post tiu dato, 2.000 ptojn.

Profitu la tre favorajn kondiĉojn por starigi sur viaj bretoj vere interesan libron, lukse bindita, kiu ankaŭ povas esti valora donaco por viaj eksterlandaj gekonatuloj.



NUR 1.500 Ptoj. (ĜIS LA 31-A DE DECEMBRO)
FARU NEFORGESEBLAN DONACON AL VIAJ GEAMIKOJ.

E-KURSO EN UNIVERSITATO.

Sro. Galofré, prezidanto de Kultura Asocio Esperantista informis pri okazigo de E-kurso ĉe la Aŭtonoma Universitato de Barcelono. Ĝi komenciĝis la 19-an de oktobro, disvolviĝos dum tri monatoj kaj valoros po tri kreditojn al la gelernantoj.

KULTURA E-SEMAJNO VALENCIA 2000.

Laŭ informo de Augusto Casquero, de la 4-a ĝis la 8-a de julio 2000, oni okazigos en Valencia (Hispanio) la "2-a Apudmara Kultura Esperanto-Semajno"-n, organizita de la lokaj esperantistoj, kunlabore kun Monda Turismo; tio ĉi, supozeble altiros sufiĉe da eksterlandanoj.

ESPERANTISTA STUDENTO SERĈATA.

Internacia fako de uonbulismo serĉas unu student(in)on, kiu volas lerni la korean lingvon, instruante Esperanton en la centro de uonbulismo, en Koreio. Li/ŝi partoprenos en la lingvo kurso de Wonkwang Universitato, kiu daŭros de marto ĝis decembro de la jaro 2000, kaj post la fina ekzameno ricevos ateston.

Tre gravas bona kono kaj instrupovo de Esperanto, kaj deziratas harmonia kaj tolerema karaktero.

REAPERIS PAŜOJ AL PLENA POSEDO.

Giancarlo Fighiera informas pri reapero de **"Paŝoj al plena posedo"**, de W. Auld (7-a eldono), la plej fama progresiga lernolibro de Esperanto.

Ekde kiam en 1968 aperis la 1-a eldono, ĉirkaŭ 20.000 geesperantistoj en la mondo perfektigis sian lingvoscion pere de tiu ĉi verko, eble la plej populara lernolibro iam ajn eldonita en la tuta historio de la Internacia Lingvo.

Ĉiu leciono komenciĝas per vortlisto: entute en la libro estas difinitaj 1.682 vortoj. Supozante, ke la lernanto en la komenco posedas elementan vortprovizon de ĉ. 700 vortoj, en la fino de la studado ĝi disponos pri, entute, ĉ. 2.400 radikoj.

Mendebla ĉe la eldonejo (Edistudio, Pisa (Italio)), UEA aŭ ĉe la naciaj libroservoj. Vendoprezo: 12 eŭroj.

NOVAJ ZEO-j.

Tie kaj tie oni starigas novajn ZEO-jn (Zamenhof/E-objektoj). La lasta novaĵo alvenas el Polio, kie okaze de la venonta Zamenhof-tago estos inaŭgurata, en urbeto Tykocin, proksime de Bjalistoko, memortabulo honore al Marko Fabianowicz Zamenhof, la patro de Ludoviko, kiu tie naskiĝis.

En Germanio, okaze de la 50-jara jubilea festo de E-Ligo Berlin, estis inaŭgurata memortabulo sur Esperantoplaco en Berlin-Neukölln, antaŭ la Zamenhofkverko plantita la 14-an de aprilo 1992, je la 75-a datreveno de la mortotago de Zamenhof

RET-ADRESO DE ILEI-CAT.

Pedro M. Martín invitas viziti kaj diskonigi la retan sidejon de la Kataluna Sekcio de ILEI: http://www.xtec.es/~pmarti10/ilei-cat.htm.

Tie vi trovos informojn pri la Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj, pri la ekzamenoj de ILEI/UEA, elementan kurson de E-to. en la kataluna lingvo, ktp.

BUDAPEŜTA TELEFONLIBRO ESPERANTIĜIS.

En la ĉi jara budapeŝta telefonlibro, laŭ oni informas en "Eventoj", en la ĉapitro de fremdlingvaj informoj, apud la angla, germana, franca, itala kaj rusa lingvoj, ankaŭ ĉi jare oni povas trovi la Esperantlingvan tekston (klarigoj pri la telefonado en Hungario, t.e., tonoj, interurbaj kaj eksterlandaj vokoj, ktp.)

IMPRESOJ PRI LA 7-a INTERNACIA E-SEMAJNO....

Mia edzo kaj mi partoprenis la "7-an Internacian E-Semajnon de la Kulturo kaj Turismo, kiu okazis en Cambrils, proksime de Salou (Tarragona).

La semajno estis organizita bone kaj malmultekoste, malgraŭ danc-bruo apude de la Esperantejo, kio malhelpis aŭskulti prelegojn. Entute aliĝis 72 personoj, inkluzive de 15 eksterlandanoj.

Mia edzo, mi kaj komencanto el Barcelono estis la plej junaj partoprenantoj; ĉiuj aliaj aĝis inter 65 kaj 91 jaroj; sed multe da maljunuloj estis tiel interesaj personoj, ke oni povas diri: "unu maljunulo kostas tri junulojn!".

Ni rimarkis interesan fakton, ke multaj instruistoj kaj aktivuloj ne posedas bone Esperanton, sed parolas vigle, ludas bonan rolon kaj kunligas homojn; sekve, ili multe kontribuas al la esperanta movado. Dume, iuj aliaj esperantistoj, kiuj posedas kaj parolas perfekte Esperanton nur kritikas kaj malbonigas la etoson.

La Kulturajn Semajnojn organizas esperantistaj fervojistoj, ne profesiaj lingvistoj; Esperanto apartenas al ĉiuj, oni ne povas postuli multe, nur interkomprenon. Viv-nivele interkompreno en Esperanto estas perfekta, ege pli bona ol en aliaj lingvoj, ĉu ne?. (Rap. I.G.)

ORGANIZA KRIZO EN TEJO.

Laŭ informo aperinta en "Heroldo de E-to.", tiu krizo en Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) atingis sian kulminon printempe 1999, kiam TEJO devis alfronti minacon perdi subvencion pro neraportado al la Eŭropa Junulara Fonduso de la Konsilio de Eŭropo pri projektoj subvenciitaj.

La krizo ne estas plene venkita, sed videblas ke la multaj pozitivaj paŝoj por plibonigi la situacion portis kaj portos rezultojn.

La komitato de TEJO diskutis la situacion en Vespremo (Hungario) dum IJK. Antaŭvideblas baldaŭa eklaboro de nova volontulo, kiu plenumos TEJO-taskojn en Roterdamo. Semajna TEJO-Seminario en la Eŭropa Junulara Centro de Konsilio de Eŭropo en Strasburgo, fine de oktobro, donis plian ŝancon por diskutoj pri la evoluigo de TEJO.

GRAMATIKAĴO

En la vorto "EBLECO" oni uzas la sufikson "-EC". La sufikso "-EC" faras de "EBLO" abstraktan econ aŭ kvaliton. Pro tio "EBLECO" temas pri io aŭ iu. Nur personoj aŭ objektoj povas havi "ecojn". Sekve personoj aŭ objektoj neniam povas havi ian econ en la pluralo. Konsekvenco estas ke la vorto "EBLECOJ" (kun litero "j") ne povas ekzisti. Tamen tre ofte oni legas ĝin eĉ en libroj kaj gazetoj.

Alia punkto estas: Oni, aŭ io, havas iun "econ" aŭ ne. Pro tio oni ne povas uzi la prefikson "MAL-" antaŭ la vorto "ebleco", ĉar "MAL-" temas pri la kontraŭo. La manko de ia eco neniam estas la kontraŭo.

Do en la vorto "MALEBLECOJ", kiun mi iam legis, estis tri eraroj:
1. Oni uzis la literon "j" malantaŭ "ebleco".
2. Oni uzis la vorton "ebleco" anstataŭ "eblo".
3. Oni uzis la prefikson "mal-" anstataŭ "ne".

La vorto "MALEBLECOJ" devus esti "NEEBLOJ".
Sugestoj: Se vi bezonas pluralon, uzu "ebloj"-n. Se vi bezonas "manko de ebleco", uzu "neebleco".

("Eventoj". 1/septembro-'99)

TRE FELIĈAJN FESTOTAGOJN KAJ PLENSUKCESAN NOVAN JARON 2000, NI DEZIRAS AL VI ĈIUJ.

LA E-GRUPO DE BILBAO